N. N. 18,

Adiaŭ

tradukita de Jan van Schoor

Por nin disigi venas
jam lasta la moment'
al paradiz' de ĝojo
reiru do sen plend'!

Liberon povas milde
donaci ja la mort';
al nova vivo iru
kaj al pli bona sort'!

Ne daŭros longe: baldaŭ
mi ĉe vi estos jam;
mi ĉi malsupre dume
memoros vin kun am'!

De nova tag' mateno
aperos, amatin':
ĝi, for de teraj zorgoj,
eterne ligos nin!

Traduko de la Germana poemo "Lebewohl" de N. N. 18 en Esperanton de Jan van Schoor .

Arg-499-976 (2009-11-29 02:01:55)

Fonto de tiu ĉi Esperantigo: `http://www.literaturo.dk/lebewohl.htm`. *S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK 4640 Fakse. Danujo), kiu verkis la retejon* `www.literaturo.dk`, *trovis la tradukon en la revuo "Heroldo de Esperanto", Köln. N-ro 20/21 (829/830). 19/26-an de majo 1935. [La ret-adreso de s-ro Lars Kromann estas:* `lars.kromann@mail.dk`*].*